

Catherine SAMAIN

**INSTRUI  
ESPERANTON  
POR  
KOMUNIKI**

Skizo pri la komunik-situacia instrumetodo

Posedi ampleksan vort-provizon kaj bone mastri la gramatikajn strukturojn ja necesas, sed ne sufiĉas, por scipovi fremdan lingvon : necesas ankaŭ akiri la kapablon uzi siajn lingvajn konojn por trafte kaj flue esprimi proprajn opiniojn, sentojn, pensojn, kaj sukcesi adaptiĝi lingve al la diversaj situacioj, kiuj povas prezentiĝi.

Alivorte, la celo de la lernado estas ne nur la akiro de lingva kompetenteco, sed ankaŭ de **komunika kompetenteco**.

En Esperanto, la lingva kompetenteco estas relative facile akirebla pro la reguleco kaj fleksebleco de la lingvo ; kaj ankaŭ ĉar nur ĝin oni instruas, almenaŭ en la granda plimulto de la lernolibroj.

Tamen la kapablo komuniki estas almenaŭ same grava, ĉar, sen ĝi, la lingvaj scioj restas vanaj.

Oni povas pensi, ke iu, kiu kapablas diri frazojn gramatike senerarajn (sed kun enhavo nula) ankaŭ povos, per la sama lingva materialo, diri ĉion, kion li volos.

En la realo, tiu ĉi opinio estas grandparte falsa : oni trejnigas sin paroli, nur kiam oni efektive parolas, kiam oni esprimas peton, senton, opinion..., ne kiam oni funkciigas malplenajn gramatikajn strukturojn.

Multaj eble diros, ke ili lernis per tradicia gramatika metodo kaj nun posedas la lingvon kaj sukcesas komuniki kontentige en multaj situacioj.

Jes, sed la malplenon, kiu ekzistis, kaj plu ekzistas, en la tradiciaj metodoj, ili simple mem plenigis per propraj, cetero neanstataŭigeblaj, spertoj : partopreno en klubaj konversacioj, en diskutoj, en kongresoj, korespondado, rilatoj kun eksterlandanoj, legado... Ne pre iumaniere ili uzis Esperanton kiel vivantan ilon kaj tiel akiris komunikan kompetentecon.

Ili do elturniĝis, kaj aliaj povos elturniĝi same.

Sed kial ne, jam de la komenco, lerni la lingvon en rilato

kun ĝia reala uzo ? Kial ne bazi la instruadon sur komunikaj situacioj kaj tiel igi la lernadon de frazoj, esprimoj, vortoj, gramatiko, pli stimula kaj tuj utiligebla ? Krome, ŝajnas al mi, ke ju pli da okazoj oni havas paroli pri propraj ideoj, ŝatoj, interesoj, des pli oni emas paroli. Ĉar, eĉ por lerni lingvon, kiu emas paroli por nenion diri ?

Por trafe instrui, la unua demando estas : kion la gelernantoj volas atingi ? Kion ili kapablu fine de la kurso ?

Ĉu kompreni kiel funkcias Esperanto kaj kapabli traduki tekston en sian propran lingvon ? (Tion oni celas, ekzemple, lernante la latinan aŭ la grekan lingvojn). Tiukaze certe plej adekvatas gramatika metodo, kiu ebligos plej rapide akiri pasivajn, intelektajn sciojn pri la lingvo.

Tamen, krom tiuj, kiuj lernas lingvojn kiel teoriajn studobjektojn, mi supozas, ke la granda plimulto lernas Esperanton por uzi ĝin kiel vivantan lingvon : ili deziras kompreni ĝin, sin esprimi en ĝi skribe kaj parole ; ili deziri akiri ilon por **komunikiĝi** kun alilingvanoj.

Nu, se komuniki estas la celo de granda parto de E-lernantoj, necesas ekzameni en tiu ĉi lumo niajn instrukutimojn. Ĉu ili helpas la konstruon de komunik-kompetenteco ?

**Ĉu la lernolibroj prezentas, aŭ povas prezenti, veran lingvo-uzon ?**

Se ni celas helpi al la lernantoj akiri la kapablon komuniki, ni prezentu al ili, kaj en kursoj kaj en libroj, ne apudmetitajn frazojn, kiuj vakue funkciigas gramatikajn strukturojn, sed lingvajn ekzemplojn de vera komunikado. Tio estas minimuma postulo. Kaj tiu postulo validas ne nur post la fino de la unuagrada kurso, post la akiro de la bazaj lingvaj elementoj : ĝi validas ekde la unua leciono kaj ĉiam. La akiro de la gramatiko, de la vort-farado, de la strukturoj ja povas okazi en rilato al vera lingvo-uzo.

Pli precize, tio signifas, ke ĉiam estu difinita, klara, preciza komunik-situacio, ke oni kapablu kompreni : kie okazas la interparolado, kiu parolas kaj al kiu, kaj ĉefe kial ili interparolas (kio estas iliaj motivoj). Nur se oni povas respondi tiujn tri demandojn, temas pri vera lingvo-uzo (interparolado, letero...). Alikaze, temas pri frazoj, kies nura celo estas instrui, sed kiujn fakte oni ne povus difini kiel lingvon en la senco de komunikilo.

Sed ĉu eblas, ekde la komenco, kiam la lernantoj ankoraŭ neniom scias, krei veran situacion ?

Jena ekzemplo, eltirita el "**Ĉu vi parolas Esperante?**" (unua leciono) montros, ke jes :

- *Bonan tagon.*
- *Bonan tagon.*
- *Mi estas Karlo Lasota.*
- *Pardonu, kiu vi estas ?*
- *Mi estas Karlo Lasota.*
- *Karlo Lasota ? Tre agrable. Mi estas Eŭgeno Guzek.*
- *Tre agrable.*

En tiu ĉi interparolado, la situacio estas klara : du personoj interkonatiĝas. Tial iliaj vortoj havas celon kaj oni komprenas kial ili parolas :

- por saluti (*Bonan tagon*)
- por sin prezenti (*Mi estas Karlo Lasota*)
- por ripetigi la alian (*Pardonu, kiu vi estas?*)
- por diri ion afablan kaj krei bonan ekrilaton aŭ por respondi socian konvencion (*Tre agrable*).

La gramatikaj nocioj renkontitaj estas relative multaj kaj (oni povus pensi) malfacilaj : akuzativo (*Bonan tagon*), adverboj (*agrabla, tre*), adjektivo (*bona*), substantivo (*tago*), pronomoj (*mi, vi, kiu*), as-tempo (*estas*), u-tempo (*pardonu*). Sed, uzinte tiun dialogon kun komencantoj, mi konstatis, ke ili havis neniun problemon por ĝin kompreni kaj neniun bezonon traduki ĝin nacilingven.

Kial ? Ĝuste ĉar la enhavo de la frazoj, la esprim-intencoj de la parolantoj, eĉ la tono de la voĉoj, la gestoj, la kunteksto grandparte helpas la komprenon kaj krome instigas la deziron kompreni, vekas la intereson. Frazoj gramatike pli simplaj sed al kiuj mankas signifo, kunteksto, intenco, ne estas pli facile kompreneblaj, male. Tiel, oni povas esti certa, ke eĉ je la unuaj paŝoj dialogo, kiu spegulas veran komunikadon, ne nur estas ebla, sed eĉ helpas kaj stimulas la komprenon - malgraŭ pli malfacila gramatiko.

Aldonindas cetere, ke paroloj uzataj en vera komunik-situ-

acio estas ofte reutiligeblaj kaj spontane reutiligataj de la lernantoj. Mi donos nur la ekzemplon de la vorto "Pardonu", kiu troviĝas en la supre menciita dialogo. Mi konstatis, ke tiu vorto estis ofte reuzata de miaj lernantoj, kaj en la kurso kaj, ankoraŭ pli grave, ekster la kurso, kiam ili provis ekuzi propranome sian scion. Kial? Ĉar ĝi respondis esprim-bezonon, gravan por komencantoj, ripetigi, diri, ke oni ne bone komprenis.

Tiu spontana reuzo (multajn samajn ekzemplojn oni povus citi) ŝajnas al mi pruvo, ke la proponita lingva materialo respondis al komunik-bezono. Male, ĉu iu havos iam la okazon demandi: "*Ĉu seĝo estas meblo?*" aŭ "*Ĉu kato estas besto?*"

Eble oni ĝenerale emas rigardi la gramatikan progreson tro grava kaj pro tio oni elpensas frazojn, kiuj neniel rilatas al vera uzo de la lingvo, eĉ foje ne havas senceon, kiuj sonas strange, artefarite, false.

Kiam male oni prioritare konsideras la esprim-bezonojn en iu difinita situacio, tiam oni havas dialogojn pli verŝajnajn, pli signifo-plenajn, pli aŭtentajn.

Sekvi iun rigoran gramatikan progresadon ne tiom helpas por la akiro de la lingvo: certe ne de la komunika kapablo kaj eĉ ne, kiel ni vidis, de la kompreno. Ĉu tiom ĝenus la komprenon, se en frazoj plejparte kompreneblaj pro la situacio, la kunteksto, la intenco de la parolantoj, troviĝus kelkaj vortoj, strukturoj, dirmanieroj, kiujn la lernantoj ankoraŭ ne kapablas klarigi gramatike? Per la uzo ili klariĝas kaj fiksiĝas en la menso de la lernantoj, kiuj nur poste (sed tiam pli bone, pli funde, eĉ eble per si mem sen klarigoj) intelekte komprenos kaj analizos.

Cetere la uzo de vera lingvo ene de difinita situacio multe helpas por ĝuste, intime, kompreni subtilajn gramatikajn punktojn: uzon de **kio**, **kiu**, **tio**, **tiu**, artikolo... Estus tro longe detali nun ĉi tiun punkton, sed mi diru nur, ke ĝi ne estas detala: ĝi rilatas al profunda regado de la gramatiko je la servo de la esprim-bezonoj.

Mi ne diras, ke oni elektu hazarde iun ajn veran inter-

paroladon kiel bazon de la instruado. Komprenoble, oni komence zorgu elekti materialon, kiu ne havu tro da malfacilaĵoj, kaj oni elektu prioritare vortojn aŭ esprimojn plej oftajn, do plej bezonatajn je la komenco. Sed la plej grava kriterio restas tamen, ke okazu vera komunikado.

Imagu gepatrojn, kiuj, por helpi sian infanon, alparolus lin nur per frazoj gramatike ĝustaj sed sensencaj kaj ĉefe sen intenco diri al li ion, nur por instrui al li, kiel oni parolas. La rezulto estus, ke li malbone komprenus (malgraŭ la simpleco de la frazoj), ke li havus la impreson esti stulta (kial diri al mi tion, kion mi ja scias ; aŭ kial demandi ion, kion ili scias?) kaj krome, ke li konsiderus la lingvon vakua kaj havus nenium emon paroli.

Ni aludis ĉi tie lastan kriterion por elekti bonan baz-dialogon. Relative ofte, oni trovas kurslibrojn kun dialogoj, kiuj unuavide ŝajnus konveni, sed de kie venas tiu impresio pri falseco, tiu manko de intereso ? Fakte personoj en ili estas tiom neŭtralaj, tiom nedifinitaj, ke ili sonas senekzistaj. Mankas al ili iom da vivo : opinioj, emocioj, sentoj, problemoj... Ŝajnas, ke li parolas nur por instrui nin, sen vera motivo.

Oni trovas multe pli da intereso en interŝanĝoj inter personoj kun difinita, aparta personeco, ol inter senreliefaj marionetoj.

Laŭ mia limigita kono, oni trovas ekzemplojn de vera komunikado en jenaj kurslibroj :

- **Gerda malaperis!** - Claude Piron (eld. Fonto)
- **Jen nia mondo!** - J. Wells
- **Ĉu vi parolas Esperante?** - A. Pettyn
- **Esperanto en dialogoj** - A. Pettyn
- **La Zagreba metodo**
- **Tendaraj tagoj** - S. MacGill (eld. ILEI/UEA/HJEA)

Tradiciaj libroj kiel "**Cours rationnel d'Esperanto**" respondas alian bezonon : fundan esploron de la gramatiko, kaj en tiu perspektivo ili havas valoran utilon ; sed oni vane serĉus en ili ekzemplojn de komunikado.

## Kiel uzi dialogojn de lernolibroj por naski komuniksitua- ojn ene de klasĉambro ?

Eĉ taŭga interparolo ne multe helpas, se oni nur pasive kaj intelekte traktas ĝin.

Iu, kiu, intelekte lerninte gramatikajn regulojn kaj vort-listojn kaj nur tradukinte, troviĝas en vera situacio kaj ĉa-grene konstatas, ke li/ŝi ne kapablas paroli, tiu estas kom-parebla al iu, kiu lerninte nur solfeĝon kaj aŭdinte muzikon, esperus jam kapabli ludi violonon.

Sed paroli lingvon, same kiel ludi muzik-instrumenton, ne estas nur intelekta procezo : ĝi supozigas longan antaŭan trejnadon kaj mobilizon de la tuta individuo ; de la parol-organoj, de la menso, de la memoro, de la emocioj, de la tuta korpo...

Kaj, ĉar la akiro de lingvo ne estas nur intelekta procezo, la lernado ne povas baziĝi sur tradukado aŭ sur ekzercoj, kiuj laborigas nur la intelekton. La instruanto devas unue proponi ekzercojn, kiuj helpu profundan, intiman asimiladon (de la prononc-maniero, de la gramatiko, de la vortoj...); due, doni okazon reuzi la akiritajn nociojn pli kaj pli persone ĝis plene libera esprimiĝado, kio estas la fina celo.

Aŭ, pli simple dirite, la instruanto devas ne montri kiel funkcias la lingvo per vakuaj, nenion dirantaj ekzemploj, sed igi la lingvon vivi per la buŝo, la menso, la emocioj, la tuta personeco de la lernantoj.

En tiu ĉi perspektivo mi vidas du etapojn :

1. - Akiro de iu(j) komunika(j) kapablo(j) : alproprigo de la proponita materialo.
2. - Trejnado al reuzo de la akirita(j) kapablo(j) en aliaj situacioj.



## I. Alproprigo

Elektinte taŭgan dialogon (laŭ la kriterioj antaŭe difinitaj) kiel baz-materialon, ni difinu kiujn kapablojn, el komunika vidpunkto, ni deziras akirigi al la lernantoj. Ni difinu ankaŭ kiujn lingvaj rimedojn ni devas transdoni al la lernantoj por servi tiun kapablon. (Kiuj vortoj, kiuj gramatikaj elementoj, kiuj strukturoj troviĝas en la dialogo kaj kiujn ni opinias oportune aldoni ?)

Nu, kiel procedi por plej efike trandoni tiujn lingvajn elementojn ?

Ni povas komenci jene (temas pri ebleco : ekzistas, kompreneble, aliaj manieroj procedi...).

Ĉerpante el la baza dialogo lernotajn vortojn, strukturojn kaj gramatikaĵojn, oni elpensu etan, simplan interparolon.

La lernantoj ludi ĝin, simulante en la klasĉambro veran situacion.

Ĉiuj duopoj ludu laŭvice ĝis la dialogo efektiviĝu flue, nature, senhezite, sentime. Kaj iom post iom ni aldonu pliajn elementojn : tiel kreskas la elekt-ebleco de la lernantoj.

Ekzemple, mi elektas kiel bazon la komencon de la unua ĉapitro de **Gerda malaperis!**

Laŭ komunika vidpunkto, mia celo estas, ke la lernantoj kapablu priskribi, karakterizi, difini iun por rekoni lin/ŝin inter pluraj aliaj. Mi proponas komence jenan interparolon. (La du personoj konas unu la alian kaj troviĝas en publika loko).

- *Saluton, Ann...*

- *Saluton, Kristin'.*

- *Diru al mi, kiu estas tiu ? (Mi montras, sed malprecize).*

- *Kiu ?*

- *Tiu viro ! (Mi montras pli klare).*

- *Ha, tiu ? Estas Gilles.*

Rapide ni aldonas la eblecon elekti "tiu viro" aŭ "tiu virino" kaj do montri iun ajn personon ĉeestantan.

Poste ni aldonu pli precizan karakterizon, ekzemple :

tiu	alta malalta juna maljuna mezaĝa	viro virino	kun	blondaj nigraj rufaj longaj mallongaj	haroj
-----	--	----------------	-----	---	-------

Ni prezentu la vortojn, kiuj estos bezonataj por karakterizi la diversajn ĉeestantojn, kaj tiel plu ĝis proksimume tio: (Ĉiuj substrekitaj vortoj estas anstataŭigeblaj per aliaj, laŭ la esprimbezono)

- *Saluton, Fred.*
- *Saluton, Mark.*
- *Diru al mi, kiu estas tiu ?*
- *Kiu ?*
- *Tiu juna virino kun longaj nigraj haroj.*
- *Kiu ?*
- *Tiu, kiu staras en la mezo.*
- *Ha, tiu ?*
- *Jes, tiu.*
- *Estas Jakelina.*

Temas pri speco de strukturaj ekzercoj, sed kun kelkaj diferencoj.

Ĉiam, ekde la komenco, per la ludado, la tuta personeco envolvigas : tiel la lingvo alproprigas pli funde, pli intime, ne nur mekanike.

Krome, la ludado de la lernantoj ne estas antaŭvidebla : ludas rolon iliaj iniciatoj.

Gravas ankaŭ la rilatoj, kiuj, per la ludado, tuj kreigas inter la lernantoj : ili ne plu estas unuforma unuo fronte al la instruanto, sed ja diversaj individuoj, kiuj interrilatas per nova, sed jam funkcia, ilo. Mimadoj, gestoj, esprimo de la voĉo... ĉio estas tre grava, ĉar per tio la lingvo iĝas vivanta.

Kiam la lernantoj kapablas vivi interparoladon, venas la momento por, pli-malpli detale, pli-malpli komplete, laŭ la

bezonoj de la lernantoj, trakti gramatikajn regulojn : klarigoj en la nacia lingvo, traduko de kelkaj frazoj al Esperanto kaj el Esperanto, specifaj gramatikaj ekzercoj..., ĉio povas esti utila, se oni memoras nur ke :

- \* la studata nocio aŭ regulo fontu ne el iu arbitra gramatika progreso sed el uzo ;
- \* la elektitaj ekzemploj estu frazoj uzeblaj en komunik-situacio;
- \* ni ne traktu la nocion unumaniere, sed kiel eble plej varie, por respondi la diversajn lern-kutimojn de la lernantoj kaj por trejni ĉiujn kapablojn necesajn por paroli (se oni ekzerciĝas nur traduki, aŭ nur apliki regulojn intelektte, oni verŝajne ne sukcesos flue paroli ; male, se oni nur parkerigas frazojn sen iam kompreni la gramatikon, oni parolos eble flue, sed fuŝe).

Post tiu preparado, la kompreno de la dialogo elektita kiel bazo estos relative facila kaj, je tiu ĉi fazo, gramatikaj klarigoj kaj traduko apenaŭ necesos (sed tamen eblos, se la lernantoj ilin petas).

Tiam aŭskultigu do la registritan dialogon, laŭ normala rapideco kaj kun esprim-riĉa tono. Sed estus eble, kaj eĉ avantaĝe, jam aŭdigi la dialogon multe pli frue, kaj plurfoje, intermite, je diversaj stadioj de la alpropriga fazo. Tiam la lernantoj ne posedas la necesajn vortojn kaj gramatikajn sciojn por ĝin kompreni : ili do atentus ĉefe la fraz-melodiojn, la esprim-tonojn... ĉefe ilia intuicio laboras. Ili aŭskultas sen streĉo, sen cerbumado pri la signifo, sed kutimiĝas almenaŭ al la muziko de la vortoj kaj al ĝusta prononco. Kaj iom post iom ili konstatos, ke ili komprenas pli kaj pli, ĝis fine preskaŭ ĉion. Tiu konstato pri propra progreso estas psikologie tre stimula.

Cetere, la dialogo stampiĝas iom post iom en la memoro kaj estas enmemorigata preskaŭ sen fortostreĉo.

Tamen, ripetado de la replikoj (ekzemple duope : du replikoj sinsekve) estas utila por kontroli la bonan prononcon kaj helpi la memorigon.

Efektive, memori la bazan dialogon estas neevitebla etapo por disponi pri stoko da vortoj, esprimoj, ekzemploj de frazoj en sia mensa provizejo. Sen tia stoko, la posta etapo, libera, propranoma esprimiĝo, ne eblas.

Sed :

- la memorigo ne nepre devas esti laŭvorta ;
- post la pretiga fazo, la memorigado plejofte jam efektiviĝis kaj ne postulas kroman laboron.

Tamen, se iu vere ne memoras, tiam li bezonas apartan helpon, ĉar li neniam parolos sen minimuma vort-trezoro kaj fraz-modeloj. Jen kelkaj sugestoj :

- Eble necesas por tiu lernanto vidi la vortojn.
- Eble li/ŝi bezonas skribi tion, kion li/ŝi aŭdas, por ĝin fiksi en la menso.

## 2. Reuzo

Se ni helpis la lernantojn alproprigi al si la proponitan materialon (kiu estas reutiligebla de ili, ĉar ĝuste pro tio ĝi estis elektita), oni jam povas esperi, ke la vivo mem en esperanta medio (staĝo, kongreso, renkontiĝo, vojaĝo, korespondado...) ebligos reuzon ; ke firmiĝos kaj personiĝos la akiritajojn dank'al aktiva partopreno en esperanto-aranĝoj, dank'al banado en esperanto-kulturo (legado de libroj, de revuoj, aŭskultado de kanzonoj, de prelegoj), aŭ, ankoraŭ pli bone, dank'al partopreno en debatoj, al verkado de artikoloj, al respondeco-preno en iu asocio, en iu projekto...

Tiaj spertoj estas necesaj, neanstataŭigeblaj, nepre travivendaj. Sen ili, al kio utilis Esperanto ? Sed ĝuste ĉar ili tiom gravas por igi la lernantojn veraj, aktivaj esperantis-toj, ĉu ni ne devus prepari ilin en la kursoj anstataŭ instrui Esperanton sen rilato kun ĝia uzo kiel vivanta lingvo, anstataŭ fidi, ke la hazardoj de la vivo plenigos la malplenon de nia instruado ?

Doni al la lernantoj la okazon persone reuzi tion, kion ili lernis kaj tiel firmigi ilian lingvan posedon kaj ilian

memfidon, tio estas la plej interesa kaj plej malfacila parto de la instruado. Ĉu ne estas strange, ne helpi la lernantojn ĝuste ĉe la plej malfacila parto de ilia lernado, kiam ili plej bezonas helpon ?

Bazan gramatikan konon ĉiu kapablas mem akiri kun helpo de klara libro. Sed uzi tiun konon por trafe komuniki : kompreni la alian ; trovi la ĝustajn vortojn kiam oni bezonas ilin ; esprimi ĝuste tion, kion oni celas sen miskomprenoj, sen simpligoj ; esprimi nuancojn, sentojn, emociojn, opiniojn ; paroli flue, senhezite, sentime... jen la malfacila tasko kaj la vera celo de la lernado kaj de la instruado.

Do ankaŭ sur tiu tereno, kaj ĉefe sur ĝi, same kiel por la instruado de gramatiko, necesas pretigi etapojn por gvidi la lernantojn, ŝtupon post ŝtupo, per taŭgaj ekzercoj, al komunika kapablo.

Tiuj ekzercoj trejnadu la kapablon reuzi la lernitajn sed ankoraŭ ne plene akiritajn nociojn, vortojn, strukturojn, sed lude, en similitaj situacioj, sen risko do kun malpli da timo, kaj kun ĉiam preta helpo de la instruanto.

Kaj tiu trejnado al persona reuzo ne komenciĝu je la fino de la kurso : ĝi komenciĝu tuj post la akiro de la unua parolago, ekzemple saluti, sin prezenti, peti ion...

Ekzemplojn de reuzo donas rolludoj. Ili povas esti pli aŭ malpli liberaj.

### **Direktitaj rolludoj**

Ni difinu la situacion kaj ankaŭ kion devas fari la rolantoj (eventuale en la nacia lingvo). Mi intence elektas tre simplajn agojn, por montri ke tre frue ni povas enkonduki tiajn ekzercojn :

Vi kampadas kun esperantista amiko. Vi vekigās matene kaj renkontigās kun via amiko. Vi salutas kaj demandas pri lia dormo.

Vi manĝas kune kun geesperantistoj. Vi bezonas salon.

Vi devas foriri trajne. Vi deziras scii, ĉu iu povus veturigi vin al la stacidomo.

Vi ĉeestas kongreson. Vi sidas apud nekonato. Vi volas konatiĝi kun li. Vi prezentigás, demandas pri li (loĝloko, profesio...).

Kompreneble, komence la lernantoj disponas pri malgranda lingva provizo kaj verŝajne restos proksime de la baza teksto. Sed iom post iom ili liberiĝos de ĝi, aldonos el siaj personecoj kaj proksimiĝos al pli libera esprimiĝo.

### **Liberaj rolludoj**

Oni nur pli-malpli precize difinu la situacion :

Karlo ricevas viziton de Ana, kiun li tre ŝatas. Ana male emas tuj foriri.

Du personoj renkontiĝas unuafoje.

La kreemo de la lernantoj estas ofte surpriza. Mi citu du ekzemplojn, travivitajn en Esperanto-staĝo de Internacia Civila Servo :

- Saluton.
- Saluton.
- Kiu vi estas ?
- Mi estas Blip-blip. Kaj vi ?
- Mi estas Ĝovo.
- Bone, Ĝovo. Kie vi loĝas, Ĝovo ?
- Mi loĝas sur planedo Venuso. Kaj vi ?
- Mi loĝas sur planedo Jupitero.
- Kaj kiujn lingvojn vi parolas ?
- Mi parolas la jupiteran lingvon, kaj la saturnan lingvon

*kaj Esperanton. Kaj vi ?*

- *Mi parolas la venusan lingvon kaj Esperanton. Mi pensas, ke ĉiuj planedoj devus paroli Esperanton, Blip-blip.*
- *Mi konsentas, Ĝovo. Sed sur planedo Tero, ne ĉiuj parolas Esperanton. Ili parolas la hispanan, la francan, la anglan, la portugalan, la grekan, la svahilian ktp.*
- *Jes, jes, tre malfacilaj lingvoj !...*

En la dua, temas pri du junulinoj : unu estas parolema, deziras krei kontakton, la alia restas fermita kaj ne volonte respondas :

- *Saluton! (...)*

*Mi estas Ann. (...)*

*Kaj vi, kiu vi estas ?*

*(...)*

*Mi demandis, kiu vi estas ?*

- *Kristin'.*

- *Mi estas usonanino. Kaj vi ?*

- *Germanino.*

- *Mi estas en Belgio por laborkampo. Ĉu ankaŭ vi loĝas en Belgio ?*

- *Momente jes.*

- *Kion vi faras tie ĉi ?*

- *Mi multe laboras. Mi estas tro laca por paroli.*

Estis agrabla surprizo, konstati kiel ili sukcesis per la malgranda lingva materialo, pri kiu ili disponis, krei originalajn skeĉojn, fakte utiligante preskaŭ ĉion. Mi ja konscias, ke verŝajne temis pri inteligentaj kaj kreivaj gejunuloj ; tamen mi ankaŭ emas pensi, ke la materialon ili povis reuzi, ĝuste ĉar temis pri vera lingvo kaj ĉar ili, tuj de la komenco, vidis Esperanton kiel esprimilon, komunikilon.

Kompreneble, mi ne diras, ke, ĉar oni komunikas, oni ĉiam traktas elstare interesajn kaj instigajn temojn : peti panon, prezentiĝi, informiĝi pri ĉambro-numero en kongreso... estas tre modeste konkretaj agoj. Sed certe ili estas pordo al pli profunda esprimiĝo de propraj ideoj, spertoj, vidpunktoj, do al vera, plena kaj persona utiligo de la lingvo-konoj.

Kial ? Ĉar, ekde la komenco, ni konsideras la lernanton

ne kiel malplenan vazon, kiun ni plenigu per lingvaĵoj senrilataj kun li, sed kiel individuon, kiu havas ion por diri kaj kiu povos, ene de situacioj plej diversaj, liveri pli kaj pli libere el siaj propraj ecoj.

Tiu ĉi skizo estas daŭre kompletigota.

Por peti pliajn informojn, konsilojn... aŭ por kunlabori per sugestoj, kritikoj... :

Catherine SAMAIN  
30, place des Tries  
F - 08320 VIREUX WALLERAND



Pour aider à se perfectionner  
le service de brochures de SAT

Cercle amical espérantiste  
FR-47470 BEAUVILLE  
C.C.P. 3371 74 M Bordeaux

a édité les ouvrages suivants :

- Abrégé pratique. Grammaire & Espéranto** (Lentaigne) 15.  
**Kiel diri...?** praktika E-frazeologio, 5000 esprimoj  
Les expressions-types de l'E. classées autour de 67 "idées"  
(Lentaigne), 136 pages 30.  
**Tiel diru !** (complément de **Kiel diri...?** pour francophones  
5000 expressions, 128 pages 30.  
**Laŭ la fluo de l' interparolo** (Bourgeois)  
(konversacia gvidlibro Franca-Esperanta) 96 p. A6 10.  
**Esprimaro Franca-Esperanta** (Bourgeois), 240 pages 50.  
**Proverbaro Franca-Esperanta kun aldono :**  
**Esprimoj sankciitaj de l' uzado** (Bourgeois), 76 pages 20.  
**Ne tiel, sed tiel ĉi !** (Faulhaber) Pour améliorer le style 15.  
**Faux amis, faux parents, "étrangers"** Les petits pièges  
du vocabulaire esp. pour les francophones (Laval) 64 p. 15.  
**40 paŝetoj al plena posedo** (Lentaigne) unua legolibro 10.  
**Lingvaj anguloj** (F. Baronnet), 104 pages 25.

Pour échanger toutes opinions  
avec des amis de tous pays  
le Cercle amical espérantiste édite la revue

**Laŭte !**

(bimestrielle, toute en espéranto)  
Abonnement pour un an, avec la liste des abonnés 60.

Autres éditions

(textes originaux ou traduits)  
Voir notre liste : **SAT-Broŝurservo**

Prix en francs français, port en plus pour les brochures

Presis : Baudé, F 47470 Beauville